**Du ŝercoj**

La sonorilo sonoras. La edzo diras al la edzino: 'Certe estas la najbaro, kiu petos ion prunte. Tio ĝenas min, ĉefe ĉar li neniam redonas la pruntitaĵojn. Ĉi-foje mi nenion pruntos.'
Kolere, li malfermas la pordon. 'Bonan matenon!' diras la najbaro. 'Mi dezirus scii, ĉu vi posttagmeze bezonos la motorciklon.'
'Certe, ĉar mi devos forvojaĝi kun mia edzino,' respondis la edzo.
'Divenite! Do vi lasos hejme la aŭtomobilon. Ĉu vi pruntos ĝin al mi?'

Sviso serĉanta sian vojon alvenas ĉe bushaltejo, kie du angloj estas atendantaj.
'Sprechen Sie Deutsch?' la sviso demandas.
La du angloj ne reagas.
'Excusez-moi, parlez-vous français?'
Neniu rezulto.
'Parlare italiano?'
Neniu respondo.
'Hablan ustedes español?'
Nenio.
La sviso lasas ilin, treege seniluziigita.
Unu el la angloj turnas sin al sia flankulo kaj diras: 'Sciu . . . eble ni devus lerni fremdan lingvon.'
'Kial?' respondas la alia. 'Tiu ulo scipovas kvar lingvojn kaj tio ne utilis al li.'

*(Fonto:* : *Eventoj* 220)

***Leginte la ŝercojn, respondu la demandojn.***

1. Analizu la vorton *pruntitaĵon.* Kiom da elementoj, kaj kiajn, vi trovas en ĝi?

2. *Sviso serĉanta . . .* Esprimu alimaniere la frazeron, ne uzante participon.

3. *. . . du angloj estas atendantaj.* Kial la aŭtoro uzas *estas* + participo kaj ne simplan verbo-formon *–as*? Kunmetu ĉiun verbo-tempon (*is, as, os)* kun ĉiu aktiva participo (*inta, anta, onta*), tiel kreante naŭ frazojn (po tri por ĉiu tempo). Uzu verbon *atendi.*

4. *Divenite!* Ĉu tiel unuvorte uzeblas aliaj adverbaj participoj? Se jes, donu ekzemplojn.

5. Kiu ŝerco plej plaĉas al vi? Kial?

6. Ŝercoj (eble la plej memorindaj) foje posedas seriozan fonon). Ĉu tiel supre?

7. **Rol-ludo.** Kun partnero, daŭrigu la konversacion – eble neniel ŝercan – inter la du najbaroj en la unua ŝerco. Daŭrigu: *La edzo:* Diable ne!

8. **Rol-ludo.** Kun partnero, prezentu daŭrigon de la konversacio inter la du angloj (evidente ne en la angla lingvo!). Daŭrigu: *1a anglo:* Jes, sed mi vere kredas, ke scipovi fremdajn lingvojn ja utilas en la nuna mondo.